

# Tagiĝo 31

Cirkulero de Esperanto Junularo en ĈSR - eldonas: Dŭm Osvĕty P. Bezruĉe v Opavĕ. Redaktas:  
Kuzník Jaroslav, Rooseveltova 17, Opava 1956/V

## *La majkanto*

Ant. Chrapavy

La Unuan de Majo,  
ho, kia granda fort',  
se koroj iuj batas  
en unu am-akord'!  
Forestas temp' dolora  
se ies paŝoj iras  
al unu sama cel',  
se sonas kant' labora:  
ni marŝas kune  
sen kverel'!

## *Ni rememoras kaj juĝas*

Pasintan monaton rememoris geesperantistoj tra la tuta mondo la mortotagon de dro Zamenhof. Pasis jam 39 jaroj de la momento, kiam forlasis nin nia Majstro kaj spirita gvidanto, kies trankvliga voĉo kaj homamaj principoj gvidis la movadon tra tempoj plej sovaĝaj.

Zamenhof montris al si vojon kaj enspiris en nian movadon sanajn principojn, kiuj mirinde defendis ĝin en situacioj plej komplikaj. Tiuj i jubileaj tagoj pensigas nin pli intense pri tio, kiel ni mem, en nia ŝtata esperantista movado uzis kaj aplikis Zamenhofajn principojn en nia laboro.

La fina celo de nia klopodo estis al ni ja dekomence klara: ni celas doni al la homaro neŭtralan lingvon, surbaze de kiu oni akcelus ekregon de la paca kunvivo inter iuj popoloj, kaj alte antaŭenpuŝus kulturen nivelon de la mondo. Sed la labormetodoj, kiujn oni aplikas por atingi unusolan celon povas varii. Ekzistas ja du grupoj, kiuj tute malsame prezentas al si venkon de Esperanto. La adeptoj, sekvantaj Zamenhofan principon negiam kredos, ke registara aŭ reĝa dekreto subite diavastigos Esperanton en la mondo. Montriĝis, ke ilia deziro de persista kaj senlaca laboro estis sola labormaniero kondukanta al la celo. Ni ne devas akcenti, ke por la dua grupo en nia movado sufiĉis unua blovo de oficiala nefavoro por tuje fortirigi kaj nerimarkate atendi kiel io finiĝos. Jen estis la legendg "vento" el Zamenhofa poemo "La vojo", kiu "velkintajn foliojn deŝiras" kaj kiun Zamenhof profete antaŭdiris.

La vento ne estis tro forta, sed tamen sufiĉis por timigi malfortajn karakterojn kiuj preferis aŭ silente aŭ perfide forlasi niajn vicajn. Tiaj estis kelkaj simplaj membroj de EAĈSR, sed eĉ funkciuloj. Sed ni dankis la venton kaj interne repurigitaj akiris novan forton por malfacila laboro kaj botelo kontraŭ la eksteraj malhelpoj. La sistemo, kiun ni hodiaŭ kutimas nomi „kulto de personeco“ tre endanĝerigis nian ekziston. Lingvosciencistoj, kiuj jam delonge deiris la vojon de la krea marksismo, krude atakis nian internacian lingvon, atribuante al ĝi senescepte kosmopolitisman karakteron. Mem Esperanton ne konante ili surde ripetadis kaj maĉis neverajn akuzojn kontraŭ ĝi. Hodiaŭa situacio klare montras, ke nia vidpunkto estis kaj restas prava, dume la menciitaj lingvistoj jam silentiĝis. Plene estas rajtigita la Zamenhofa principo, ke neniu aŭtoritatulo per sia apriora malaprobo kaj malfavoro povas haltigi evoluon de la afero, kiu jam fariĝis posedaĵo de vastaj

popolaj tavoloj de geesperantistoj. Nia esperantistaro estas do garantio, ke nia agado ne povas esti ignorata kaj likvidota!

La pozitivaj perspektivoj jam konturiĝas: TKKE traktas kun la Centra komitato de komunista partio en ĈSR, kies sinteno absolute ne plu estas rituza. Same la afero staras en Slovakio. La novan aeron ĉirkaŭ nia movado nepre ĉiu el ni jam sentas! Jen ni staras sur la sojlo de novaj, tiom sopirataj, laboreblecoj!

Sed nun dependos ĉio denova nur de ni!! Eraras tiu, kiu opinias, ke ni jam venkis! De la pasintaj jaroj ni ricevis nebonan heredaĵon! Multaj el ni al kutimiĝis al sia "persona" labormetodo, kiu ne povas alporti utilon. La aliaj praktikas partizanecan agadon, ignorante paragnfojn, kaj ofte endanĝerigante la kunlaborantojn. Ni nepre devas koncii, ke nia ĝenerala linio devas esti unueca kaj – serioza! Komprenu vi, karaj gesamideanoj, por kiuj fariĝis Esperanto memcela idolo sen reala tasko, ke via infannaiva propagando de Esperanto estas la plej grava malutilo por nia lingvo. Vi kompromitas ĝin kaj vekas nur ironian grimacon de la publiko, kiun ni volas akiri. Agu ĉiam serioze!! Oni eĉ ne povas kredi, ke mense sana ĉeĥa esperantisto povas korespondi kun niaj plej altaj institucioj: Akademio de la Sciencoj kaj Ministerioj - en ESPERANTO kaj peti, ofte eĉ en malĝentila formo, permeson por partopreni la eksterlandajn aranĝojn. (Kopenhagan kongreson). La samon mi povas diri pri tiuj, kiuj skribas al la redakcioj de niaj gazetoj kaj petas favoran artikolon pri Esperanto! Komprenu, ke via agado en la tempo, de ne tre zorge kaŝata malfavoro, kaj eĉ ankoraŭ nun, similas al homo, kiu petas vangofrapon! Ĉu vi atendis, ke Mladá Fronta post viaj abundaj demandoj represos glorigan artikolon pri Esperanto?? La rezulto, kiu sekvas estas tute nature konsekvenco, kiun kaŭzis NI!

Estas dezirinde, ke ni ĉiuj bone pripensu ĉiun agon, ĉu ĝi ne malservas al nia movado!

Granda doloro, kiu ŝarĝas niajn ŝultrojn en la nuna situacio estas, ke niaj fortoj ne estas kunigitaj. Nur la junularo en ĈSR havis depost 1950 ĝis nun firman organizan sistemon, agopovan. La estinta EAĈSR likvidiĝis kaj por ĝiaj grupoj kaj anoj ekestis jaroj de la tute individua laboro, kiu iam estis sukcesa, iam fiaskis, iam similis je anarkiaj entreprenoj. Tia stato estas kompreneble fekunda je esencaj ideologiaj problemoj, kiuj sekve de la organiza kaoso estis solvataj ankaŭ individue. La ideologian konfuzon kaŭzis manko de la gazetoj kiuj gvidus la diskutojn kaj unuigus la vidpunktojn.

Fine aperis pli malpli bonaj anstataŭantoj de ili: La cirkuleroj. Sed baldaŭ estis sentebla diferenco inter ili. Zamenhofa neŭtraleco estis temo ofte diskutata kaj ofte malsame kompenata. Tiam aperis homoj, kiuj arogante asertis, ke ili savis la tutan ĉeĥoslovakian movadon antaŭ certa disfalo. "Kulto de personeco" manifestiĝis eĉ en nia movado, kiam tiuj ges-anoj provis trudi nedemokretie siajn opiniojn al la aliaj. Se tiaj homoj intencas dividi la esperantistaron je du diferencaj grupoj, poste ili devas konscii, ke ili nepre vekas malsimpation kontraŭ si!

Sed ni komprenas tiun ĉi historian ŝtupon! La ĵus travivita tempo ne povis ne naski miskomprenojn kaj erarojn. El la pasinto ni lernas. Sed nun ne plu ni rajtas eksperimenti! Hodiaŭaj tagoj estas decidaj eble por multaj jaroj. Ni ĉiuj, kvankam niaj kapoj ankoraŭ brulas pro batalo pri problemoj ĝis nun nekontentige solvitaj, amike unuigu sur la platformo de bazaj Zamenhofaj principoj:

DEMOKRATIO, PACAMO, NEŬTRALECO.

VI. Novobilský

## *Nia informservo*

Nia esperantista junularo sukcesis en Britujo.

Danko de ĉs. ambasadoro.

La junulara Esperanto-Rondeto en Žďár n.Sáz., kiun ni konas kiel tre aktivan, atingis bonegan sukceson en internacia ekspozicio de infanaj desegnaĵoj el 24 landoj, aranĝita en la angla lernejo en Strood. Laboraĵoj de infanoj el lernejoj en Žďár n./Sáz. inspiris specialan atenton kaj rekonon de la vizitantoj. La ekspozicion rigardis kun intereso ankaŭ membroj de la ĉs. ambasado. Du desegnaĵoj de le 14-jara lernanto Vašátko eĉ estis elsenditaj de la brita televido BBC inter aliaj plej bonaj.

La Esperanto-Rondeto en Žďár n./S. ricevis ne nur dankleteron de la aranĝantoj de l' ekspozicio, sed ankaŭ leteron de la ĉeĥoslovaka ambasado en Londono, en kiu tiu ĉi dankas pro la bona propagando por la ĉeĥoslovakaj lernejoj.

(Tion ĉi ni nomas bona kontribuo al plifortigo de internaciaj kulturaj interrilatoj. Koran gratulon, Junularo en Žďár!

J. Mařík, TKKE-sekciestro por Junularo.)

-o-

La loka rondeto en Poděbrady invitas eksterlokajn samideanojn al sia unua kunveno, kiu okazos 3.6. je 9 h. en la restoracio "u Bílé růže." Aliĝu ĝis 18.5. ĉe Fr.Pytloun, Poděbrady, Jungmanova 29/I.

#### Esperanto ekspozicio en Písek.

estis solene malfemita en ejo de la teatro 16.3. dum ĉeesto de 60 personoj, inter ili de 24 esp-istoj el Ĉ. Budějovice, Netolice, Písek, Praha, Strakonice, Tábor. Paroladon faris J. Šustr, klubestro de Praha, kaj D-ro P. Sádlo el Praha ludis je violonĉelo. La ekspozicio estis bone aranĝita kaj havis riĉan materialon, kies gravan parton pruntedonis helpeme samideanoj el multaj lokoj. Sume iom pli ol 300 personoj vizitis la ekspozicion, inter ili granda grupo de soldatoj. 13 personoj deziras eklerni Esperanton, knaboj interesiĝis pri SET.

La radiostacio Ĉ. Budějovice elsendis ufiĉe longan raporton pri la ekspozicio kaj avizon enpresis "Písecký kalendář kultury a oddechu."

RD L.Křivánek kore dankas al ĉiuj, kiuj helpis al sukceso de tiu ĉi aranĝo.

- o -

#### Esperanta „MARYŠA" en kadro de LUT.

La dram-rondeto de Esperantista klubo en Praha donis al si elstaran taskon - montri la belecon de la ĉs. drama literaturo. Ĝia prezentado ĉe la konferenco en Otrokovice trovis varman akcepton de eksterlandaj partoprenantoj kaj la Verda Ĉaro de J. Baghy ricevis inviton ludi en Bulgario, Ju- goslavio kaj Hungarlando. Por tiu celo V.Ĉ. studia la dramon de fratoj Mrštík "(aryša" kaj prezentis ĝin tre sukcese 18.4. en Malá scéna en Praha. (El Junularo Praha ludis: Řiháčková, Nývltová, Pastor, D-ro Sádlo). Por vidi la unuaan prezentadon venis eĉ samideanoj el malproksimaj lokoj (Děčín, Chotěboř, Bonumín, Partyzánská Lupča k.s.) 7.5. la prezentado estis ripetata kiel konkursa prezentado de Lidová umělecká tvořivost (landa konkurso de popolaj artistoj) antaŭ prijuĝa komisiono de LUT. - V.Ĉ. preparas surscenigon de "Pygmalion" de G.B.Shaw.

- o -

#### ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO por blinduloj.

La libro "Ĉeĥoslovaka antologio", reprezenta verko en Esperanto pri la ĉeĥoslovakaj literaturo kaj belartoj, aperinta en 1935 en Budapeŝto, estas daŭra ornamaĵo de ĉiu Esperanta biblioteko eksterlanda. Ĝi estas citata inter la plej gravaj verkoj de la bibliotekoj, kiel ni legis en eksterlandaj gazetoj.

Ankaŭ en Britujo ĝi estas ŝatata. "The British Esperantist" informas, ke nia antologio ekzistas eĉ en la Brajla skribo kaj estas pruntedonata de National Library for the Blind (Nacia blindula biblioteko) en Londono al blinduloj.

-o-

#### Populární Esperanto.

Který předmět je nejobíbenější na whitburnské škole Pupil secondary modern school? Košíková? Zeměpis? Kriket? Počty?," táže se anglický časopis Sunderland Echo a dodává: "Nedejte se splést. Esperanto překonává v popularitě všechny předměty. To říká ředitel školy R. Muncaster. Esperanto je nejpopulárnější předmět na naší škole. Tento jazyk napomáhá obzvláštní mírou v ostatních předmětech a i při studiu anglické mluvnice. Studující, kteří se začali učit cizím řečem po vyjití ze školy shledali, že znalost esperanta jim v tom nesmírně pomáhá..."

Praxe za jednu penci má cenu jako libra teorie, že? - dodává „The Britian Esperantist“, z něhož zprávu čerpáme.

# Nia grupa vivo

## Regiono Praha-K. Vary-Ústí n.L.(RD-VI.Novotný)

Praha: la grupa vivo kunvena iom stagnis dum la frostoj (manko de karbo) kaj refortigis kun la paso de la frostoj. Novotný daŭrigas kurson por blinduloj, el kiuj kelkaj ŝatus partopreni SET. Tri membroj ludis en la dramo "Maryša" (vidu apartan informon).

Most: Laŭ raporto januara, la ZK-OKH Most, kies parto estas la esp. rondeto, nuligis sian intencon likvidi la rondeton. OKH sciigis, ke ĝia intenco estis bazita sur malĝustaj informoj kaj ĝi elvokis la rondeton daŭrigi sian agadon. 3.12.55 estis aranĝita nikolaa vespero. Sed de tiu tempo neniu raporto venis de vi s-anoj en Most. Vi eĉ ne resendis plenigitan matrikulon! Revigliĝu!!

Karlovy Vary: La grupeto kunvenas ĉe s-ano Horák. De 28.3. kurso por 10 komencantoj sub gvido de V. Horák. Kurson por tri infanoj gvidas V.Škvrnová. "Lázeňský časopis" aperigis informon pri la laboro. La rondeto serĉas pli bonan bazon por sia vivo (ĉu ĉe Osvětová beseda en Doubí) En Ostrov aperis ebleco de kurso (s-ano Míkšik)

Polák, ap. Kadaň: Jar. Podešva (el Přerov) kolektis 30 interesantojn. Bezonus instrumaterialon por kurso.

## Regiono České Budějovice (RD-L.Křivánek).

Kursoj okazis en Č. Budějovice, Netolice, Písek, Strakonice.

Písek: Kurso finita 9.3. per ekzamenoj. Poste la tuta energio de la grupanoj estis dediĉita al sukcesa aranĝo de Esperanto ekspozicio. Kelkaj membroj pruvis grandegan oferecon por nia afero, same kiel neesperantisto Zdeněk Jíša, distrikta kleriga inspektoro. - Vidu apartan informon pri la ekspozicio.

## Regiono Plzeň (RD J.Hořejší)

Plzeň: 12.12.55. agrebla nikolaa vespero ĉe familio Zýka. La junularo kontribuis al programo de Zamenhofa vespero 16.12., aranĝita de la loka grupo. Inter novjaraj gratulantoj al la rondeto estis J.Baghy. Membroj de la junularo partoprenas en laboro de traduk-rondeto, fondita 13.1 sub gvido de D-ro J. Černý. La unua libro tradukata estas "K Krakatit" de K. Čapek. 27.1. malfermiĝis kurso por 15 komencantoj plej-parte junaj.

Cheb: Regule kunvenas 6 gelernantoj (2 knabinoj kaj 4 knaboj) de loka rondeto por studi esperanton.

Regiono Pardubice, Hradec Kr.Liberec (RD-K. Franc)

Raportoj ne venis.!!!? -

## Regiono Brno, Jihlava, Gottwaldov (RD-O.Kaláb).

Brno: El 18 membroj kunvenas regule ĉ. 14. Okazas kursoj A, C kaj D. 11.-12.2 la junularo sukcese aranĝis regionan konferencon kaj tradician maskobalon. La konferencon partoprenis 40 esp-istoj el 10 lokoj. 20.3. la Junularo prezentis de en EKB per bone preparita programo "Junulara karuselo". Ĝi estis plua sukceso de la grupo. 16 membroj vizitis reg. konferencon en Třebíč.

Kroměříž: Februaro-marto: neniu raporto. Aprilo: Nova komitato estis elektita. Nova loka delegito: Jiří Koukal (Chobot 1515, Kroměříž). Okazas kursoj A kaj B kun 10 partopr. La rondeto de ok membroj kunvenas merkrede en ul. Prusinského (dř. Starý pivovar) 15,30 - 18,30 h.

Svitavy: Ĉiusemajnaj kunvenoj kun bonaj variaj programoj. Oni parolas nur Esperante. Por pliperfektigi en la konversacio la rondeto formis kelkajn grupetojn. 6.1. diskutvespero kun F.Pytloun el Poděbrady pri univ. kongresoj. La nombro de Tagiĝo-abonantoj kreskis de 2 al 15. Estis aranĝita ekspozicieto de leteroj kaj de PK de la plej junaj kurs-frekventintoj.

Třebíč: Kursoj A,B,C, daŭras. En bone vizitita diskutkunveno de gepatra unuiĝo (104 partopr.) prof. Kilián prelegis pri la signifo de Esperanto, la junularo prizorgis gajan programon. Du ski-ekskursoj estis aranĝitaj. Jarkunveno kun 35 partopr. pritraktis gravajn aferojn de la Rondeto, same kiel 3 komit.kunvenoj. La Rondeto denove aranĝos someran tendaron, nun sole por siaj membroj. 22.4. okazis regiona kunveno en Třebíč (post interkonatiĝa vespero 21.4., en kiu 16 gejunuloj el Brno prezentis amuzan unuhoran programon) La kunvenon partoprenis samideanoj el 9 lokoj de Moravio kaj Bohemio. (Vidu apartan informon). - Membroj partoprenas ankaŭ konkurson pri kolektado de restaj krudmaterialoj.

Žďár nad Sázavou: Kursoj A kaj B daŭras. 11 novaj Taigiĝo abonantoj estis varbitaj. Dua propag. vitrino ekfunkciis. Kultur-referento de ONV promesis helpi aranĝon de E-ekspozicio. Membroj de la Rondeto eminentiĝis per tre sukcesa partopreno en ekspozicio de infanaj desegnaĵoj en Anglujo (vidu apartan informon). Pri la sukceso raportis "Práce", "Lidová demokracie", gazeto "Osvětová beseda" publikigis desegnaĵojn de J.Vašátko (ilin jam publikigis ekspozicia katalogo en Strood, Anglujo, "Esperanto" kaj "Espero" en Stokholmo).

Regiono Olomouc: (provizore prizorgis D.Kočvara, Ostrava; nova RD: Václav Šimeček)

Olomouc: (laŭ raporto de grupestro B. Nevrlý). Kvaronjara eksterordinara kunveno 13.3. pritraktis la aktivecon en 1956 (partopreno en seminario de regiona kunveno, en arta vespero, prezentiĝo de gefratoj Rek, alvoko al hungaraj korespondantoj renkontiĝi apud ŝtata limo). Pro frostoj la rondeta vivo lamis. Akceptita laborprogramo ĝis 30.6.: regulaj kunvenoj marde 18-19,30 h en Smetana-parko kun partoj kursa, literatura, organiza, kanta kaj luda.

Enspezon el brigadlaboroj oni utiligos por aŭtobusekskurso el Jeseníky, kaj Doksy. Post alvoko en "Tagiĝo" oni elektis novan regionan delegiton, ĉar la ĝisnuna tute ne plenumis le funkcion. La nova RD estas Václav Šimeček, 24-jara, aktiva en Svazarm (velaviado) kaj en ČSM. (La Centrejo bezonas lian adreson!)

La E-Junularo en Olomouc konsistas el 12 homoj efektive junaj, maksimume 14 jaraj, escepte de RD. Ni rekomandas al ili ankaŭ personan kontakton kun alilokaj junularaj rondetoj kaj partoprenon en SET!

Regiono Ostrava (RD-Drah.Kočvara)

estas nun la plej vigla, se oni taksas la amplekson de agado kaj la batalspiriton.

Ostrava: En kadro de ZK VŽKG daŭris 4 kursoj, finitaj 15.2. per ekzamenoj de sume 19 partoprenantoj. 22.2. oni malfermis novajn kursojn (elementan kun 17 partopr. gvidas Dr.Kočvara, por 12 progresintoj gvidas kurson M. Neuwirth, perfektigan kun 6 partopr. Čermák kaj superan kun 7 p. Adámek). - 11 membroj partoprenis la konferencon en Brno, aliaj paroladon de Vítek en Třinec.

En la regiono okazas kursoj en OUPZ 11 en Ostrava-Hrabůvka (Kočvara, 22 p.), Ostrava-Vítkovice (12 infanoj de mezlernejo, J.Bujas), Dolní Bludovice (25 infanoj de mezlernejo, O.Schwetter), Vítkov (mezlernejo, 12 infanoj, plenkreskula 10.p., gvidas J.Skařupa), Stěbořice (12 infanoj de mezlernejo; A.Křístek), Jakartovice (infana rondeto, J. Hadámek), Příbor (4. lernantoj de OUPZ 17) kaj en Kopřivnice (infanoj; ambaŭ gvidas instr. A. Satték) la infanoj en Kopřivnice faras murgazeton en sia lernejo, kiu vekas grandan intereson. Ili korespondas kun popoldem.landoj.

En Třinec la grupo harmonie laboras kun malnovaj s-anoj. Kial ĝi ne redonis ĝis nun la demandaron (Matrikulon)? En Rýmařov estas vigla rondeto. En Jeseník s. Pečínka gvidas kurson por 30 anoj. (Same pri la matrikulo!) - En Místek (Bartovská, Matušková) kaj en Hradec u Opavy (J.Solnický) intencas fondi aŭ renovigi junularan grupon. En Drahotuše Rost. Richter gvidas junul. grupeton kun tri kunlaborantoj. En Opava Vlast. Kočvara gvidas kurson kun 15 part. 14.12. okazis Zamenhofa vespereto en la kulturdomo. Laŭ iniciato de Vl. Kočvara aranĝis junulara grupo okaze de granda ekspozicio de industriaj entreprenoj el Opava distrikto fine de aprilo, malgrandan informan Esperanto ekspozicion, kiun rigardis granda nombro da vizitantoj. Tiu ĉi grupo denove

organizos SET 1956.

### S l o v a k i o - (Milan Zvara)

Multaj funkcioj ĝis nun malhelpis al s-ano Zvara raporti pri la aktiveco en Slovakio. Nun li estas iom pli libera kaj promesas kunlaboron.

En Bratislava la junularo kunvenas ĵaŭde en Kleriga Domo (prezidas s.Slivka) kaj merkrede kun la pliaĝuloj. La afero de la rondeto en Poprad, subite disigita, ankoraŭ ne estas solvita.

En Svit la grupo kunvenaa regule ĉiusemajne (laŭ decembra raporto). Ĝia cirkulero "Juna Voĉo" estis ĉesigita fare de ZK.

En Prakovce estas absoluta stagno.

En Košice fondiĝis, laŭ s-ano Kremer, rondeto en lernejo, en kiu li gvidis kurson, sed klopodo ekkontakti kun ĝi estas senrezulta.

S-ano Zvara estas gvidonta elementan kurson en Bratislava de 27.3. La Domo de Kulturo eldonis tiucele plaĉan verbfolion (per "rotaprint").

- o -

Jen speguliĝas en seka resumo la aktiveco en la Rondetoj kaj unuopaj regionoj. Montriĝas progresado plurloke kaj aliloke almenaŭ bona volo. En iuj lokoj ankoraŭ fantomas strangaj opinioj de aŭtoritatoj rilate la ĝustan signifon de la lingvo internacia. TKKE faras antaŭpaŝojn por meti la tutan movadon en Ĉeĥoslovaka Respubliko sur firman bazon unuecan. La komencaj traktadoj kun centraj instancoj jam okazis en Praha kaj Bratislava. La vojo ne estas facila, sed ni firme esperas superi la obstaklojn, apogante sin sur la pozitivaj prijuĝoj de Esperanto kaj de ĝia rolo fare de tri katedroj de la plej alta scienca institucio, la Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj. Ni tamen bezonas helpon de vi ĉiuj! Precipe ĉiu funkciulo en ĉiu loko plenumu ĝuste kaj akurate siajn devojn.

Mi deziras al ĉiuj multe de energio kaj da sukcesoj J. Mařík, ĉefdelegito.

### Kiu rondeto ne sendis la „matrikulon“?!

Preskaŭ ĉiuj rondetoj resendis al sia reg. delegito la alsenditan "matrikulon" (demandaron), kiu estas necesa fonto por centra kartoteko de la ĉefdelegito pri la aktuala stato de la junulara movado. Kiu rondeto ankoraŭ ne resendis ĝin, sendu ĝin plej baldaŭ al Jar. Mařík, Malá Štěpánská 9, Praha 2. Kiu rondeto (nova) ankoraŭ ne ricevis ĝin, petu pri ĝi je la sama adreso.

- o -

La E-grupo en Třinec sciigas, ke tie okazos seminario de 4.-10-a de junio t.r. Por la samideanoj, kiuj aliĝos ĝis 15. de majo, ni prizorgos la 50% fervoj-rabaton. La 10-an de junio estos tradicia pilgrimo al monto Ĉantorio sur ĉeĥo-pola limo. Anoncoj estu adresataj: ZK ROH železáren V.M.Molotova,n.p., Třinec, kroužek Esperanto.

- o -

### Uĉebnice esperanta od s. Kiliána zнову rozmnožena.

Kroužek Esperanta v Rýmařově vydal se svolením Th.Kiliána jeho učebnici Esperanta. Poněvadž mají učebnic více než mohou potřebovat pro své kursy Esperanta, mohou asi 160 učebnic rozprodati kroužkům, které by je potřebovaly. Učebnice je velmi úhledně a čitelně napsána a je svazána do formátu A5. Její cena bez poštovného činí Kčs 8,-. Objednávky řiďte na adresu: J.Temlíková, Stalinova 15, Rýmařov.

- o -

### Honorigo al „Tagiĝo“.

Nia cirkulero ricevis proponon de la prezidanto de Tutmonda Esperanto-Junular-Organizo, s-ano Reiter, ke Tagiĝo fariĝu tutmonda organo de TEJO. Kvankam la propono signifas rekonon al nia Tagiĝo, ni vidas multajn malfacilaĵojn en ĝia realigo.

- o -

De s-ano Rezner Jan, Glucholazy, ul. Powst.Ś1:2/IV pow.Nysa, Pollando, ni ricevis diversajn novaĵojn el la Esperanta mondo, kiun ni ĉi tie publikigas.:

La Kulturkomisiono de la Eŭropa konsilantaro unuanime aprobis la rezolucion pri Esperanto. La komisiono por Kulturaj kaj Sciencaj Demandoj de la Eŭropa Konsilantaro, kunveninta la 25-an de Januaro en Parizo, unanime aprobis la proponon entenitam en la Rezolucio de la 14 Re prezentantoj en la Eŭropa Konsilantaro, laŭ kiu oni rekomendos al la Komitato de la Ministroj la eksperimentan instruadon de Esperanto en kvin lernejoj de Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Nederlando. (el „Esperanto“ - febr. 1956.)

La Hungarlanda Konsulta Komitato priparolis dum sia dua kunveno la 13-an de novembro en Budapeŝto gravajn problemojn. Oni ĝoje akceptis la inviton de la Asocio de Esperantistoj en Pollando por fari konferencon de delegitoj de la oriento-eŭropaj kaj aziaj popoldemokratiaj landoj en Varsovio.

En Erevan - la ĉefurbo de Soveta Armenio estas organizita Esperanto - rondeto en Erevana ŝtata Universitato. La kurson partoprenas 24 sciencaj laboruloj de la filologia fakultato - profesoroj, docentoj kaj lektoroj de la katedroj de armena, rusa, orientaj kaj okcidentaj lingvoj. La solena malfermo okazis la 14-an de Decembro 1955. Baldaŭ komenciĝos lecionoj ankaŭ por grupo da gestudentoj de Erevan Pedagogia Instituto sub gvidado de pedagogo S. Mertiĉjan. Estas petataj sugestoj flanke de Esperantujo per salutleteroj ke diversaj eldonaĵoj en Esperanto. Ĉion oni adresu al: Prof. Gurgeno Sevek, Poŝtkesto 76, EREVAN, Armenia U.S.S.R.

Kelkaj informoj pri Esperanto movado en Pollando. Lastatempe la E-movado en Pollando iome plifortiĝis. En monato decembro 1955, la ŝtata eldonejo "Polonia" eldonis du esperantlingvajn librojn. Unua de A. Mickiewicz "Sinjoro Tadeo" en bela traduko de A. Grabowski kaj dua de Jastrun pri "A. Mickiewicz". En preparo estas la eldono de "Faraono" de B.Prus kaj verko de Tuwim. Oni volas ankaŭ eldoni aliajn ĉefverkojn de pola literaturo. Ankaŭ ĉi jare oni volas aranĝi en Pollando la E-unumonatan Ferion (simila al nia SET.)

#### Regiona konferenco de Junularo en Třebíč 22.4.56.

La kunvenon prezidis RD de regiono Brno Olda Kaláb. Ĝenerale pri Esperanto kaj ĝia evoluo parolis s. Th.Kilián kaj s.Lička. Poste sekvis raportoj de RD por regionoj Brno, Ostrava kaj Plzeň.

Post la raportoj sekvis vigle diskuto el kiu ni mencias kelkajn kaj provos ilin laŭ eblecoj respondi.

1. Estis pridiskutita la konkurso en Tagiĝo. Oni proponis ke estu sendataj reen korektitaj taskoj aŭ skribi en Tagiĝon precizan tekston. (Je tio ni respondis sur pĝ 9 kaj 10 de tiu ĉi numero.)

2. Oni proponas pro kaŭzo de malmultaj abonantoj kununuigi Tagiĝon kun Pacdefendanto aŭ Praha bulteno. (Je tio mi dezirus respondi, ke la ĉeestantoj certe havis iajn erarajn informojn, ĉar neniam malbona stato de Tagiĝo ekzistas, ja ĝi nun havas plej multajn abonantojn dum tempo de ĝia ekzisto. Ĝi estas dissendata en nombro 550 ekzempleroj. Abonis ĝin 330 s-anoj. Estas necese konscii, ke propono de la kunveno kunligi Tagiĝon kun Pacdefendanto aŭ Bulteno signifus tute malaperon de unusola specifika ligilo de Junularo.)

3. Skribi en Tagiĝo esperantajn supersignojn kaj ne ĉeĥajn. (Pri tio jam foje estis skribite, ke por tajpado oni bezonas skribmaŝinon kun longa cilindro kaj tian maŝinon oni trovas nur en oficejo. Do ne estas eble sur fremda maŝino fari iajn adaptojn)

4. Junulara konferenco (vidu aliloke)

5. Ne utilas kontakti kun redakcioj de ĵurnaloj en 'formo akra aŭ malĝentila (vidu ĉefartikolo)

6. Centrejo postulu ke almenaŭ unu s-ano partoprenu Mondan festivalon de demokrata junularo en Moskvo 1957 - (pere de TKKE prizorgata)

7. Klarigi demandon, kial abonantoj de "Spegulo" ne ricevadas ĝin, aŭ kien aperis la mono sendita al ĝi kiel abono. (Ni ne scias respondon).

## Rimportreto Dr.

Drahomír Kočvara, gaja Dionizo,  
de l' dancavidaj inoj ideal',  
de bonhumoro sana integral',  
per spritfontan vin atakos sen avizo!

La movadon ne minacas stagno, krizo,  
se tenas direktilon Admiral':  
Drahomír Kočvara, gaja Dionizo  
de l' dancavidaj inoj ideal'!

Riĉas rikolto sur kamp' de l' organizo,  
se pretas maldormi nia General':  
en grupoj blovas ag-naska mistral'!!  
Finiĝos gloriga mia improvizado pri  
Drahomír Kočvara, gaja Dionizo.



Drahomír Kočvara estas regiona delegito por Ostrava. Li apartenas al unuaj organizintoj de nia junulara movado en ĈSR. Neforgeseblajn meritojn li akiris pro efika organizado de Rožnov-kolegioj. Ĉiuj partoprenintoj de Rožnov-kursoj kaj frekventintoj de SET ŝate rememoras bonhumoran verdan medion, kiun li ĉiam sciis krei.

## Korespondu

1. Liceo NU' TRUNG HOC TRUNS-VUONG
2. Esperanto rondeto ĉe Liceo Trung hoc Nguyen-Trai
3. Trubrtg léien Nam Ro 11 - Ha-dong via ,
4. Esp.Ber4o-Béo Nhan-Den /por ddceo Chu-Van-an/ Hanoi - ĉiuj adresoj en Vietnamo.
5. Tibor Nagy, Vasútállomás, Esztergomtábor, Hungario
6. Ladislao Vezér, Danjanich 7.út, Es: tergomtábor, Hurg.
7. Antal Eugeno, Temesvári út, - " - " -
8. Gyózó Perger, Damjanich 7.út, - " - " -
9. Emeriko Szabo, Damjanich 7.út, - " - " -

## Niaj legantoj skribas al ni

Alekseev Sergej, Kolchot"Žiznj i Trud", Stalinak, Kemerovskaja oblastj, Atamanovo. - U.S.S.R

Kara gejunularo esparantista en Opava kaj la tuta Ĉeĥoslovakio! Kara s. Jar. K.! Mi informas vin, ke la 29-an kaj 30-an numerojn de Tagiĝo atingis min en Siberio kaj tre multe ĝojigis. Mi ja dum 18 jaroj nenion aŭdis pri nia kara lingvo Esperanto. Kaj pri la renaskiĝanta movado en USSR mi ekaŭdis el Praha, ankaŭ pri movado en la mondo. Viaj belaj numeroj de la cirkuleroj informigis min ankoraŭ plu. Mi antaŭdankas ankaŭ pri plua sendado de via ŝatata cirkulero. ....



Andrej Sidorov, Krjukovo, ul. Nekrasova 12, rejon Ĥimki, Moskovskaja oblastj. U.S.S.R.

En "Bulteno" el Praha mi legis informon pri enhavo de "Tagiĝo" N 27, kiu tre interesas min. Sincera kaj pasia deziro iel helpi, akceli renaskiĝon de E-movado en nia lando devigas min skribi el vi kaj peti vin. Kvankam mi estas malnova esp-isto ekde 1914, tamen preskaŭ mi nenion scias pri nuntempa E-movado. Dum lastaj du monatoj mi ricevis kelkajn informojn pri sukcesoj de E. en Polio kaj ĈSR, sed mi nenion scias pri agado de sovetiaj esp-istoj kaj mi ne sukcesis eĉ ligi kun ili kontakton.

Kiel estas konate en 1957 okazos en Moskvo 6-a Mondjunulara festivalo. Jam nun sovetiaj junularaj ĵurnaloj publikigas konsiderojn, dezirojn, proponojn por la festivalo. Kelkaj artikoloj pritraktas lingvajn problemojn. Por havi necesan materialon por ĵurnalartikolo pri okazintaj kunvenoj esp-istaj dum la pasintaj Mondjunularaj Renkontiĝoj mi petas vin, sendu al mi N.27 de Tagiĝo, kie mi trovos raportojn pri E-renkontiĝo en Varsovio, Somera Esp. Tendaro, sukcesoj de E. en USSR kaj popoldemokratiaj landoj.

Mi volas vidi grandegajn sukcesojn de E-movado en nia lando kaj mondscale. Mi volas kredi kaj esperi...

- o -

Andor Laczko, Esztergomtábor, Tameavári út 18, Hungario.

El nia rondeta vivo.

Dankon por tio, ke Tagiĝo publikigis mian artikolon kiun mi skribis pri nia E-vivo. La Tagiĝon mi legas tutkore, ĉar ĝi estas tre bona. En ĝi estas aresoj kiujn en nia rondeto uzas la membroj.

Antaŭ nelonge ni ricevis multajn leterojn el diversaj landoj de s-anoj, kiuj deziras korespondi kun niaj membroj. En februaro ni aranĝis grandan Esperanten renkonton, interregionan. Tien venis ankaŭ eminentaj esperantistoj kiel: Julio Baghy, Ludoviko Márton, St. egerváry ktp.

Ankaŭ ni aranĝis grandan sukcesan ekspozicion. Ni ricevis leteron de la Hungarlanda Esp. Konsilantaro, en kiu ili laŭdis nin pro la entreprenita renkonto. Kiam parolis en la hungara radio s-ano Balkányi, ni atente aŭskultis. Li parolis pri la Esp. lingvo, kaj la parolado tre plaĉis al ni. Fine de aprilo ni aranĝos Esp. semajnon. Ni aranĝos ankaŭ E-ekspozicion por loĝantoj de Esztergomtábor. Ni esperas, ke ni sukcesos. Ni rememoros la vivon de Zamenhof kaj ni parolos pri la hungara Esp. vivo. Ni sendos salutleterojn al la hungaraj Esp.rondetoj. Ni sendas niajn salutojn al "Tagiĝo" kaj al legantoj de la Tagiĝo.

# Kion ni faru dum la kunvenoj

Memoru: Se vi volas eduki bonajn esperantistojn kaj krei firman kolektivon, vi devas zorgeme prepari la kunvenprogramojn!

Jen kiel povus aspekti via venonta kunveno:

1. - La kunvenon malfermas prezidanto, precize je la indikita horo! Se vi nur unufoje komencos iomete malpli frue, rezulte estonta duono el viaj ges-anoj konstante venados malfrue je (almenaŭ) duonhoro.

2. - Gramatika horeto – hodiaŭ vi detale studos la ĝustan uzon de la artikolo. Vidu "Gramatikan anguleton"!

3. - Laŭ Tagiĝo kaj aliaj periodaĵoj informu viajn gesamideanojn pri aktuala stato de la movado! Pri traktu partoprenon en SET 1956.

4. - La literaturo neniam manku en viaj kunvenoj! Hodiaŭ tralegu kaj pripensu poemon de Esaias Teguér: "Tio, kio eternas", en la perfekta traduko de s. Magda Carlsson (el Sveda poemaro). La poemon, kiu spiras veron de la centjaroj, kiu montras al ni moralan esencon de la historio kaj homa vivo inspiru vin al parkera ellerno:

Esaias Tegnér

Tio, kio eternas

Ja formas fortul' ĝian mondon per glav',  
ja flugas lia fam kiel aglo,  
sed iam la glavo rompigos sen sav'  
kaj aglo mortfalos pro-kuglo.  
Kion kreas perforto, minacas necert'  
ĝi mortas kiel ŝtormo en la dezert'.

Sed vivas la vero. Ĉe glav', gilotin'  
ĝi staras kun frunto radia,  
Tra nokta la mondo ĝi gvidat', ĝis fin'  
montrente al mondo alia.  
La vero eternas. Tra ter', firmament'  
tiel vortoj resonas de gento al gent'.

La justo eternas. Ne trafos eksterm'  
ĉi piedpremitan lilion.  
Se .enkos malbono la mondon ĝis kern',  
konservos vi justokonscion.  
Se ĝin persekutos la ruzo, armil',  
ja restos por ĝi via brusto azil'.

Kaj voĉo, flamanta en brusta karcer',  
karnigeĝ pro ago subite:  
la just' havas brakoj kaj voĉon la ver'-  
popoloj levigas ŝanĝite.  
Kaj viaj oferoj kaj via danĝer'  
kiel staloj sin levas el Lethe-river.

Poezi' ne forflugas kiel flora odor'  
aŭ bunta arkponto ĉiela.  
Se belon vi formas, ĝi ne pasos for,  
ĝin tempo eĉ faros pli bela.  
La belo eternas. Kun arda tener'  
ni kribras ĉi oron el temporiver'.

Por ver': nia amo, por justo: atent'.  
Pri belo kun ĝoi fantaziu!  
Ĉi triu ne mortos el inter homent',  
al ili ni, apelaĉiu.  
Kion temp' al vi donis, redonas vi,  
se nestos en vi la eterna tri.

**Luno.**  
Malrapida, mallayroĉa

Bona lun' vi ku movas tra vesperaj nuboj vin  
Vi trankvilita ebla povas helpi ĉi kon-sol'

min. (1. de u-ruo astro he-la ga-jo i-ri kiel vi sed ho


2. Bona lun', al vi mi diras  
kiel plendas mia kor',  
kaj al kiu ĉiam iras  
miaj pensoj kun dolor'!  
Bona lun', ĉar vi silentas,  
nur al vi mi diras ĝin,  
kio ade min turmentas,  
igas plori min sen fin!

3. Jen en tiu verda valo,  
inter densa foliar',  
flanke de la akvofalo,  
staras domo en arbar'.  
Iru tien brilo via,  
en domet' vi vidos sin;  
tie loĝas koro mia,  
mia kara amatin'.

1. Bona lun', vi kiu movas  
tra vesperaj nuboj vin.  
Vi trankvila eble povas  
helpi kaj konsoli min.  
Mi dezirus astro hela  
kaĝe iri kiel vi  
sed ho sorto plej kruela  
devas resti tie ĉi!

5. - Kiu ne ŝatus solvi enigmojn? Ili akriĝas nian menson, ili instruas nin.

s. Iserentant Roger el Brurge, Belgio sendis por vi saan "Magian ŝtuparon" kaj deziras al vi agrablan amuzon:



Per la ĉi subaj difinoj serĉu horizontale kaj vertikale la samajn vortojn por plenigi la kvadratetojn. (R - signifas radiko)

1. artikolo de la homa korpo (R)-2. vaporiĝema fluidaĵo (R)- 3. familiano - 4. birdo –  
 5. batalejo (R) 6. prilaborita felo - 7. floro (R) - 8. ruinrestaĵo 9. birdo (R) - 10. valoro (R)  
 La solvon post atenta tralego de Tagiĝo 31 vi mem trovos.

6. - Se ni diras: JUNULARO - reproduktas al ni tuj en la menso: k a n t a d o -. Kiu junularo ne kantus. Kaj tial ni ellernu novan popularan germanan kanton "LUNO", kiun tradukis I.Ziermans.

7. - La Junularo estas ludema. Antaŭ fino de la kunveno ludu jenan ludon:

K i a l - ĉ a r.

Ĉiu ludanto ricevu du slipetojn. Sur la unuan skribu bonhumoran, neofendan demandon, komencantan per la vorto "kial".

Ekz: Kial ranoj ne ŝatas rajdi sur ĉevaloj? Kial Pepeki kisas Marinjon?

Sur la duan slipeton skribu gajigan respondon, komencante per la vorto "ĉar". Ne estas necese, ke la respondo rilatu al la demando!

Ekz: Ĉar la situacio en proksima oriento pliakraĝus.

Ĉar la leĝoj ordonas zorgi pri la infanoj.

Unu partoprenanto kolektu demandojn, la alia respondojn. Demando kaj respondo estu alterne voĉlegataj.

(Laŭ C. Walter)

# Slovo k čtenářům

